



同語

# Mikrofone

8-a jaro • Julio-Septembro, 2010





## Redaktora mesaĝo

Estimataj legantoj! Nia kaj ankaŭ via kuriero "Mikrofone" fondita en 2003, ĉiam ricevas fortan subtenon kaj ĝuas vastan ŝaton de legantoj post sia apero.

"Mikrofone" estas jam fenestro, tra kiu viaj vortoj el letero kaj retmesaĝo karesas la okulojn de tutmondaj samideanoj.

Nun la distribua kvanto superas milon kaj centojn da ekzempleroj. En 2007 la kuriero fariĝis gazeto trimonata kaj, en la estonteco eble dumonata dank' al abundiĝo de viaj kontribuajfoj. Ni atendas vian pluan subtenon en la komuna redaktado!

Ja bonvenaj estas ĉiuj kontribuajfoj rilataj al nia disaŭdigo kaj la E-Movado. Ni kune deziru pli prosperan estontecon de nia Mikrofone!

# ENHAVO

**3** Speciala raporto pri la 95-a UK

**6** Momentoj de la 95-a UK

**7** Seminario de Ĉina Sekcio de ILEI

**8** Terfalo kaj koto-ŝtona fluo en la gubernio Zhouqu

**10** Cititaj Leteroj

**12** Intervjuo  
Floréal Martorell, grava motoro de Esperanto-muzika movado

**14** Tra la Mondo

**15** Mikronovelo  
Homo kaj Simio en zoo

### ĈRI bezonas alilandajn laborantojn

Esperanto-Redakcio de Ĉina Radio Internacia planas varbi alilandan laboranton kun la servodaŭro de unu ĝis tri monatoj. Se vi bone scipovas la internacian lingvon Esperanto kaj havas la volon vin dediĉi al Esperanto-komunikado, bonvole vin anoncu laŭ la retadreso: [esradio@cri.com.cn](mailto:esradio@cri.com.cn)



## Speciala raporto pri la 95-a UK

**De la 17-a ĝis la 24-a de julio, 2010, okazis la 95-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano, Kubo. Sume 1 003 esperantistoj el 59 landoj kaj regionoj partoprenis en ĉiŝoja UK. Ĉina Radio Internacia sendis 2 raportistinojn por rekte elsendi freŝajn novaĵojn al niaj aŭskultantoj.**

Je la 10-a horo de la 18-a de julio laŭ la loka tempo, solene inaŭguriĝis la 95-a UK en Havano, ĉefurbo de Kubo. Prezidanto de UEA Probal Dasgupta prezidis la inaŭguron. La kongresa temo estas "Interproksimigo de Kulturoj". Post la inaŭguro, IKU okazigis la inaŭguron kaj d-ro Humphrey Tonkin, rektoro de la

Kongresa Universitato, prelegis rilate al la kongresa temo sub la titolo "Ŝekspiro en multlingva mondo", kaj la ĉeestantoj kunĝuis liajn kontribuojn al la studado pri la epoko de Ŝekspiro inkluzive de du libroj kaj abundaj artikoloj. Per sia flua parolado kaj interesa maniero de prezentado, li montris, ke malgraŭ la angla fono de Ŝekspiro, liaj verkoj iĝis internaciaj kaj fariĝis posedaĵo de la homaro. Oni ludas kaj ŝatas liajn teatraĵojn ĉie, tutmonde. Krom IKU, ankaŭ estas aliaj enhavoriĉaj aranĝoj, ekzemple Tutmonda Esperanto, Kongresa Temo, Ĝemelaj Urboj, Tejo Sin Prezentas kaj tiel plu. Cetere ni ankaŭ faris intervjuon al niaj amikoj novaj kaj malnovaj,

inkluzive de kelkaj gravuloj. Vespere, centoj da esperantistoj ĝuis la Nacian Vesperon, kiu estis plena de densa kuba ĉarmo.

La 19-an de julio, dum la 95-a UK okazis abundaj aktivadoj por la ĉeestantoj. Kleriga Lundo ludis la ĉefrolon en la tiutaga aktivado kaj tuŝis al diversaj temoj, kiaj UN kaj UNESKO, Ekonomia Esperanto, Muzika Instrumento por Instruado de Esperanto, Japana Arto, ktp. Serio da malgrandaj seminarioj celas instigi aktivan partoprenon de ĉiuj kongresanoj en gaja kaj kunlaborema etoso.

La 20-an de julio, je la 9-a horo tri novaj estraranoj de UEA por la periodo de 2010 ĝis 2013 faris sinprezentadon. Ili estas



Maritza Gutierrez Gonzales, pri landa kaj regiona agado, Stefano Keller, pri eksteraj rilatoj kaj Amri Wandel, pri scienca kaj faka agado. Tiu tago ankaŭ estas la Tago de Lernejo. La temo de ĉijara Tago estas plezuro de lernado kaj instruado. Aurora Bute organizis ĉirilatan aktivadon kaj Renato Corssetti, Stefan McGill kaj aliaj elstaraj esperantistoj faris prelegojn. Samtage ankaŭ KAEM, IKEF kaj aliaj esperanto-societoj organizis kunvenojn aŭ kunsidojn. Antaŭ inaŭguro de UK, post sekreta baloto kaj voĉdonado de la Komitato de UEA, 6 kandidatoj sukcesis fariĝi novaj komitatanoj de UEA. Kiel kutime ankaŭ en ĉijara UK, estas enhavoriĉa kultura aktivado kaj ni invitas sinjorinon Claude Normont, vic-prezidanto de UEA respondeca pri kulturo, kongresoj kaj edukado por fari konigon.

Kiam ni petis, ke ŝi proponu

vizitindajn kulturajn aktivadojn, ŝi unue rekomendis aktivadon Aŭtora Duon-horo. Laŭ ŝi la aktivado estas unika okazo renkontiĝi kun aŭtoroj kaj tiel pli intimiĝi kun ili. Kaj eblas demandi kaj interaktivi.

La 22-an de julio, en la kvara tago de la 95-a UK aperis nova tajdo de aktivadoj. La Centra Oficejo de UEA respondis demandojn de kongresanoj pri la funkcio de la organizo. Je la 12-a horo okazis kunsido de aŭskultantoj organizita kune de Ĉina Radio Internacia, Klubo de Havano kaj Pola Radio. Mirinda faris konigon pri la historio kaj evoluo de E-elsendo kaj E-retejo de nia radio. Krome, Maritza Gutierrez, Sonia Risso Gonzales kaj Jennifer R Bishop respektive konigis evoluon de E-elsendo respektive nome de Havana Klubo, Aktiva Radio kaj Aŭstralia Radio. En la responda tempo,

prezidanto de Rusa Esperanto-Junulara Movado Aleksander Osincev proponis utiligi novan teknikon en E-disvastigo. Marc Bavant el Francio specife menciis, ke li eklernis la ĉinan lingvon el nia retejo antaŭ ol veni al Kubo. Li alte laŭdis la ĉinlingvan kurson liveritan de Ĉina Radio Internacia. Krome ankaŭ aliaj esperantistoj jesis novan provon fare de Ĉina Radio Internacia por la E-retejo.

En seminarioj okazigitaj de IKU, Maritza Gutierrez Gonzales, respondeculo de Esperanto-servo de Klubo de Havano faris prelegon sub la titolo Lingva Diverseco en Latinameriko: defioj por daŭrigpova evoluo, en kiu ŝi konigis lingvan mozaikon de latinamerika kontinento.

En la fermo publikiĝis la kongresa rezolucio. UN deklaris la jaron 2010 jaro de proksimigo de kulturoj, dum Universala Kongreso konstatas,





ke la diverseco de kulturoj en la mondo grave kontribuas al la riĉeco de la homaro. Jam dum 123 jaroj Esperanto kiel neŭtrala lingvo helpas konstrui ponton inter popoloj kaj kulturoj, kaj Universalaj Kongresoj de Esperanto konigante homojn el diversaj lokoj tra la mondo, konstruas interproksimigajn pontojn.

Kiel kutime, ĉifoja UK ankaŭ estas soleno de diverslandaj amikoj novaj kaj malnovaj. Dum la UK, ni televide intervjuis pli ol 10 gravajn samideanojn de la esperantujo, kiel Amri Wandel, Humphrey Tonkin, ktp, kaj faris serian raporton pri funkciigo de abundaj aktivadoj okazintaj dum la UK. Pere de nia raportado, vi povas koni preskaŭ ĉiujn flankojn de la Universala Kongreso kaj lerni ion el la plej famaj aktivuloj de nia esperantujo.



# Momentoj de la 95-a UK



Impreso pri Havano



Vigljaj kaj energiaj kongresaj infanoj



Diplomo pri Elstara Arta Agado



Raportistoj de ĈRI en la UK



# Seminario de Ĉina Sekcio de ILEI, 2010

La 2-an de aŭgusto inaŭguriĝis en la urbo Taiyuan en la provinco Shanxi, seminario de ĉina sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kun la temo "pasinteco, estanteco kaj estonteco de E-instruado en Ĉinio". La seminarion partoprenis 59 esperantistoj el Ĉinio, Koreio, Danio, Japanio kaj Usono.



- 4 kursoj por infanoj, gestudentoj
- Komencintoj kaj progresantoj
- 13 prelegoj pri edukado kaj E-metodoj
- 4 raportoj pri E-instruado en Ĉinaj kaj japanoj lernejoj
- 2 demonstraĵoj kursoj
- Konigo de internacia ekzameno de Esperanto
- Interkona vespero
- Amuza vespero
- Arta Vespero
- Ekskursoj
- Reta prelego
- Reta babilado per skajpo
- Reta transsendo de la seminario
- Libroservo



Sekretarioj



Glossop



Jeong-Yeol JANG



# Terfalo kaj Toto-ŝtona Fluo

## Zhouqu

Frumatene de la 8-a de aŭgusto okazis terfalo kaj koto-ŝtona fluo pro fortaj pluvoj en la gubernio Zhouqu de la provinco Gansu, ĝi kaŭzis multajn mortojn kaj vundiĝojn de homoj kaj perturbon de elektroprovizo, trafiko kaj telekomuniko. Ĝis la 18-a de aŭgusto, en tiu ĉi aparte granda katastrofo de terfalo kaj koto-ŝtona fluo 1 287 homoj mortis, 457 homoj perdiĝis kaj 1 243 homoj estis savitaj.

En tiu tagmezo ĉina ĉefministro Wen Jiabao hastis al la katastrofo por aranĝi savadan laboron. Post la katastrofo la provinco Gansu tuj lanĉis la unuagradan urĝan reagon kontraŭ inundo kaj la duagradan urĝan reagon por savado el natura katastrofo, kaj diversspecaj porsavaj materialoj estis tuj transportataj al la katastrofo. La ĉinaj Civilafera Ministerio kaj Fervoja Ministerio organizis kaj transportis porsavajn materialojn el centra rezervejo en Xi'an, kaj la porsavaj materialoj multe helpis la homojn suferantajn kaj solvis ilian malfacilon en la

vivado.

Post granda koto-ŝtona fluo en gubernio Zhouqu de Gansu-provinco, ĉinaj elmigrintoj kaj ĉindevenuloj en diversaj lokoj de la mondo intense atentis la situacion de la katastrofo kaj samtempe lanĉis monkolektadan aktivadon por helpi al la suferantoj en la katastrofo pasigi la malfacilon. De Nov-Jorko de Usono ĝis Tokio de Japanio kaj de Sidnejo de Aŭstralio ĝis Hago de Nederlando, multaj organizoj de ĉinaj elmigrintoj monkontribuis al la katastrofo Zhouqu. Vizaĝante al la katastrofo ĉinoj prezentis sian amon al la samlandanoj.

En la 2-a tago post la granda koto-ŝtona fluo en Zhouqu, Asocio de

Ĉinaj Elmigrintoj en Orienta Usono okazigis monkontribuadon por la katastrofo. Centoj da lokaj ĉinoj aktive partoprenis en la aktivado kaj kolektis monon kaj materialojn por subteni la katastrofojn. Ĝenerala sekretario de la asocio Lin Xuewen konigis,

"La Asocio de Ĉinaj Elmigrintoj





en Orienta Usono havas preskaŭ 200 subasociojn. Aŭdinte la informon pri la katastrofo ni tuj alvokis la delegitojn de diversaj subasocioj kaj apelaciis monkolektadon. Tiutage ni kolektis 51 mil dolarojn. Ĝis nun ni ankoraŭ faras monkolektadon por helpi la katastrofejon."

La Asocio de Ĉinaj Elmigrintoj en Orienta Usono jam petis, ke ĉina ambasadorejo en Nov-Jorko transdonu la monon al la katastrofejo en Gansu-provinco por fari savadon kaj rekonstruadon. Samtempe la asocio sendis al ĉinoj en Usono iniciaton por daŭre fari monkontribuon.

En Eŭropo, delegito de ĉindevenuloj en Belgio transdonis 20 mil eŭrojn monkontribuitajn de ĉindevenuloj al ĉina ambasadoro en Belgio Zhang Yuan kaj petis lin sendi la monon al la katastrofejo. Laŭ konigo, daŭras la monkontribuo de diversaj ĉindevenulaj organizoj en Eŭropo. Prezidanto de Nederlanda Ekonomia kaj Teknika Disvolviĝa Centro de Ĉinaj Elmigrintoj Lin Son diris,

"Post la granda koto-ŝtona fluo en Zhouqu ĉinaj elmigrintoj



kaj ĉindevenuloj en Nederlando ĉiam zorgas pri la suferantoj en la katastrofejo kaj aktive faras monkontribuadon. Estro de Nederlanda Wencheng-Samlokana Asocio Hu Zhenkuan iris al ĉina ambasadorejo en Nederlando en la 13-a kaj monkontribuis 20 mil eŭrojn al la katastrofejo."

Post la katastrofo, estro de Federacio de Ĉinaj Elmigrintoj kaj Ĉindevenuloj en Ehime Lin Quannan unuatempe sendis leteron al Fei Yafu, la prezidanto de Federacio de Ĉinaj Elmigrintoj kaj Ĉindevenuloj en Gansu-provinco, kaj monkontribuis 200 mil jenojn. Sinjoro Lin Quannan diris, ke kvankam li estas en eksterlando, tamen ilia koro ĉiam zorgas pri la patrolando kaj samlandanoj.

Kanada Federacio de Ĉinaj Elmigrintoj kaj Ĉindevenuloj tre zorgas pri la katastrofa situacio

en Zhouqu. La federacio kaj aliaj organizoj de ĉinoj en Kanado kune okazigas monkontribuajn aktivadojn respektive en la 15-a, la 21-a kaj la 29-a, por helpi la katastrofejon en la rekonstruado.

Ĝenerala vicsekretario de la Federacio de Ĉinaj Elmigrintoj kaj Ĉindevenuloj Lin Youhui kortuŝe diris,

"Aŭdinte la informon pri la katastrofo, ni tuj komencis monkontribuadon. Tiam mi sentis la sinceran emocion kaj unuigĝan spiriton de ĉinoj".

Laŭ nekompleta statistiko, la monkontribuo de diversaj organizoj de ĉinaj elmigrintoj kaj ĉindevenuloj jam estis donita al lokaj ĉinaj ambasadorejoj. Ĝis nun ankoraŭ daŭras la monkontribuado de eksterlandaj organizoj de ĉinaj elmigrintoj kaj ĉindevenuloj.



## Cititaj Leteroj – 海外飞鸿

### Sawaya Yuita el Japanio:

*La 21-an de majo, Sawaya Yuita vizitis nian oficejon, post reveno al sia patra lando, li sendis leteron al ni:*

La moderna pompa konstruaĵo de Ĉina Radio Internacia staras tre proksime de la stacidomo de la unua linio de la subtera fervojo, Babaoshan. Antaŭ 18 jaroj, kiam mi vizitis Pekinon, mi aŭdis, ke ĈRI estas en suburbo malfacile trafikebla. Nun la plilongigita unua linio de la subtera fervojo faris tion jam malnova historio. Sufiĉas 15 minutoj per la subtera fervojo de la urbo-centro por iri al ĈRI.

Esperanto-Redakcio de ĈRI havas tre vastan oficejon kun multaj tabloj kun komputiloj. Kiam mi vizitis ĝin, nur kelkaj esperantistoj-oficistoj laboris en la oficejo. Min bonvenigis s-ino Wang Fang, la vicdirektoro de Esperanto-Redakcio de ĈRI. Ili ĉiuj tre flue parolas bonan Esperanton. Ŝi donacis al mi tre luksan Esperantan gazeton de ĈRI, "Mikrofone", kies PDF-formo estas metita en la retpaĝaro de ĈRI.

S-inoj Chen Lina kaj Wang Weishi, konataj figuroj kaj voĉoj sur la retpaĝaro de ĈRI, intervjuis min. La studio estas malvasta ĉambro, bone ekipita per la plej novaj aparatoj

por registro kaj redaktaj laboroj.

Estas ne facile en Japanio kapti la realan elsendon de ĈRI, sed mi ofte vizitas la retpaĝaron de ĈRI kaj aŭskultas retan else ndon en klara bonkvalita sono sen bruoj. Lastatempe ni povas rigardi interesajn originalajn filmetojn de Esperanto-redakcio de ĈRI en la retejo. Mi alte taksas la originalajn filmetojn. (Mi povis revidi s-ron Wang Minghao en la filmeto pri Ŝanhajo. Mi renkontiĝis kun li en Teag, Koreio, en 1994, kaj ni havis agrablan tempon kun tieaj Esperantistoj. Tiam li havis abundan densan hararon kaj mi la nigran.)

Mi povas havi relative pli liberan tempon ekde la lasta jaro. Mi komencis observi Esperantajn retejojn. Kvankam mi ankoraŭ vizitas nur parton el ĉefaj retejoj de Esperanto, sed la retpaĝaroj de Ĉina Informo-Centro-esperanto, ESPERANTO.com.cn kaj ĈRI elstaras je enhavo kaj skalo. La antaŭaj du retpaĝaroj estas ligitaj ankaŭ kun aliaj Esperantaj retejoj, kaj alprenas novaĵojn el eksterlandaj Esperantaj retejoj kaj informojn el eksterlandaj individuoj.

Mi mem spertis en tiu ĉi vojaĝo povon de la rapida informado en la retejo. Al mi estas tro granda honoro, ke Ĉina Informo-Centro-esperanto

detale raportadis mian privatan vojaĝon viziti lokajn esperantistojn en la provinco Shandong kaj Tianjin.

Mi elkore dankas la profesiajn esperantistojn de ĈEL kaj Esperanto-redakcioj de EPĈ kaj ĈRI, ke ili bonvenigis min, donacis al mi librojn kaj revuojn kaj ne ŝparis tempon por mi. Mi estas tre ĝoja, ke mi povis rigardi la oficejojn de la profesiaj esperantistoj kaj interparoli rekte kun ili.

### Ges-roj Ivo kaj Ada Bopovečki el Kroatio:

*Ges-roj Ivo kaj Ada Bopovečki eatas malnovaj geamikoj de nia Radio. Post lego de la revuo "Mikrofone" No.28, ili ege ĝojis pro la artikolo de sinjorino Li Yuping, kiu kiel nia raportistino vizitis ilian hejmon en 1985. En sia letero, li skribis:*

Mia edzino Ada kaj mi bone kaj ofte rememoras ĉiujn momentojn de ŝia vizito al Pula, kaj kun granda intereso ni plurfoje tralegis ŝian artikolon, en kiu ŝi per flataj vortoj rememoras nin kaj ŝian restadon ĉe ni. Ni tre petas vin transdoni al ŝi niajn dankojn kaj niajn varmajn salutojn. Por ŝi ni kunsendas nian foton faritan antaŭ kelkaj tagoj.

Diru al ŝi, ke ni ĉiuj sufiĉe bone

fartas, same niaj familianoj: filo Ranko, 48-jara ĉefredaktoro de la loka kaj regiona tagjurnalo “Glas Istre” (La voĉo de Istrijo), nepoj Slaven kaj Ivor (21- kaj 11-jaraj respektive) kaj bofilino Morena. La filo kun sia familio loĝas en propra domo en Vodnjan, 10 km. ekster Pula.

Malgraŭ mia alta aĝo (86 jaroj), mi aktivas en Esperanto-movado, tradukante kroatajn poeziaĵojn al Esperanto kaj okupiĝante pri lingvistiko kaj historio.

Dum multaj jaroj mi okupiĝis pri Ĉinio, ĝiaj historio, kulturo kaj lingvo, kaj mi havis honoron renkonti kaj interparoli kun pli ol cent membroj de diversaj ĉinaj delegitaroj venintaj al Pula. En 1984 mi havis la feliĉon renkonti kaj oficiale saluti en Pula la iaman prezidanton de via lando sinjoron Li Xiannian, kaj de 1979 ĝis 1982 restadis en Pula sep ĉinaj inĝenieroj en nia ŝipfarejo, kaj mi kun ili ofte renkontiĝadis lernante de ili la ĉinan lingvon kaj instruante ilin pri la kroata lingvo. La samo okazis antaŭ 4-5 jaroj en Pula kun du ĉinaj komercistoj.

Mi daŭre ofte aŭskultas radioprogramojn de Ĉina Radio Internacia, sed matene inter la sepa kaj naŭa horo (laŭ la loka tempokalkulo), en la lingvoj rusa, angla kaj germana, sur la ondolongo de 15445 KHz, 17720 KHz kaj 16820 KHz. la Esperantan elsendon peritan de Albanio sur la ondolongo de 1215 mi ĉitie entute ne aŭdas kaj la vesperajn programojn je 9745 kaj 7265 KHz mi tre malbone aŭdas. Mia sola ligilo kun vi en Esperanto do estas via revuo Mikrofone, kiun mi regule ricevas 4 foje jare kaj legas kun granda intereso.

Dum la 100-jara kultura festo pri Esperanta kulturo en 1987 (Zagreb), mi konatiĝis kun sinjoroj Laŭlum kaj Nan Youli. La lasta eĉ tradukis al la ĉina unu mian tradukon al Esperanto. Temas pri la poemo “Kaprimo” far

Grigor Vitez. La saman poemon poste ĉinigis ankaŭ sinjoro Laŭlum, ne sciante, ke Nan Youli ĝin jam ĉinigis. Mi tre petas vin transdoni miajn elkorajn salutojn al tiuj du ĉinaj amikoj.

SinJORINO Li Yuping skribas pri la iamaj E-elsendoj en Esperanto far Radio Varsovio kaj Radio Sofio. Mi deziras atentigi vin, ke ekzistis regulaj semajnaj radio-elsendoj en Esperanto ĉe Radio Zagreb ekde somero 1953 ĝis somero de 1992, do, plenaj 39 jaroj!! De 1953 ĝis aŭtuno de 1956 mi estis redaktoro kaj parolisto de tiuj elsendoj, kaj helpis min kiel parolisto sinjoro inĝ. Beroslav Brajan kaj f-ino Svetlicic. En aŭtuno de 1956 mi foriris al Etiopio por labori en Addis Abeba kiel ĉefo de radiologia fako en la hospitalo por malriĉuloj. Sendis min tien la registaro en la kadro de la “teknika helpo al neevoluintaj landoj”. Mi restis tie ĝis la somero de 1960 kaj de post tio mi laboris en Pula. Mi emeritiĝis en la jaro 1987.

SinJORINO Li Yuping parolas ankaŭ pri la universitata E-fako, kie ŝi lernis Esperanton. Ĉe la Zagreba Ekonomika Fakultato ekzistis oficiala lektorado pri Esperanto de 1926 ĝis 1939 kaj instruis tie d-ro Dusan Maruzzi.

Mi estis tie lektoro de 1954

ĝis aŭtuno de 1956, kaj post mi transprenis la lektoradon d-ro Fran Janjic ĝis sia morto meze de sepdekaj jaroj. Tiuj informoj estus interesaj por nia amikino Li Yuping.

### Jiri Patera el ĉeĥio:

Mi dankas al vi pro viaj regulaj kaj interesaj ĉiutagaj unuhoraj programoj en Esperanto. Mi aŭskultas viajn programojn tre ofte, sed mi ne sukcesas aŭskulti dum la tuta horo, tio estas tre multe por mi. Tamen mi ĉiam estas tre kontenta. Ekzemple sabate mi aŭdis la eldirojn de d-ro Josef Kavka, kiujn vi surbendigis pasintjare dum via vizito ĉe li. Estis interese aŭdi lin eĉ post unu jaro. Kaj lunde, do hieraŭ, vi legis mian leteron pri la nuntempa kriza ekonomia stato en la mondo. Mi opinias, ke la krizon startigis usonaj bankoj, kies sola celo estas akiri grandegajn profitojn, kaj kontraŭe Ĉinio per sia ekonomia potenco kaj samtempe prudenta ekonomia politiko sukcesas mildigiti tion, pri kio kulpas la kapitalistaj bankoj.

Apud viaj radio-elsendoj mi tre ŝatas vian ttt-paĝon, kie mi povas ĉiutage trovi novajn informojn pri Ĉinio, antaŭ ĉio pri la Monda Ekspozicio en Ŝanhajo.



## Floréal Martorell, grava motoro de Esperanto-muzika movado

Floréal Martorell, naskiĝinta en la jaro 1956, estas franca esperantisto, muzikŝatanto kaj grava motoro de la Esperanto-muzika movado. Li estas fondinto de EUROKKA, Esperanto-muzika produkto Vinilkosmo kaj la eks-gazeto Rok-gazet'. Akceptante intervjuon de "Mikrofone", kuriero de Esperanto-Redakcio de Ĉina Radio Internacia, li detale rakontis bonan kunlaboron inter Vinilkosmo kaj artistoj, kaj lanĉis alvokon kontraŭ piratado, kiu de longtempe ĝenas Esperanto-muzikon.



**Mikrofone: Pro kia okazo vi ekhavis la ideon vin dediĉi al la Esperanto-muzika komunumo?**

Floréal Martorell (Flo): Mi esperantistiĝis en la jaro 1987. Fakte tiutempe mankis moderna Esperanto-muziko. Mi pripensis la rilaton inter Esperanto kaj rokmuziko kaj decidis starigi ion. Mi volis alporti mian kontribuon por pliriĉigi kaj plivastigi ĝin. Poste mi serĉis muzikistojn kaj junajn esperantistojn, kun kiuj mi povus starigi Esperanto-rokasocion. En oktobro, 1987, mi demisiis de CAM (muzika asocio de lokaj francaj artistoj), kaj en januaro, 1988, fondis EUROKKA-n. En majo 1990 kreiĝis la diskeldonejo Vinilkosmo kun la apero de la unua disko (vinila disketo, Amplifiki/La Rozmariaj Beboj) kaj la gazeto Rok-gazet'. Mi estras la eldonejon kaj helpe de kelkaj kunlaborantoj faras artajn decidojn kaj orientiĝojn por la aperontaj eldonoj.

**Mikrofone: Interesas nin, kiamaniere Vinilkosmo instigas artistojn partopreni en Esperanto-muzika movado? Ĉu vi povas doni ekzemplojn?**

Flo: Nu tio estas hazardo de renkontoj kaj interesoj. Kiam lanĉiĝas projekto, ni prezentas ĝin al diversaj artistoj atentemaj

pri la lingvaj problemoj. Tiel okazis ankaŭ kun JoMo. Iom simile okazis ankaŭ kun la itala bando "Revado" (Rêverie), kiu nun registras tutesperantan albumon.

Nu estas kutime tre bona kunlaborado kun la artistoj, ĉar ni klopodas ĝuste helpi kaj sekvi ilin, programante ilin en koncertoj kaj disvantigante ilian muzikon per niaj retejoj (diskoservo, elŝutejo kaj ankaŭ plej diversaj aliaj en Myspace, facebook, Ipernity, Esperanto.com, Esperantujo, Twitter, LinkedIn, ktp). Mi povus rakonti dum horoj pri kunlaborado kun artistoj. Mi ekzemple indikas pri la du antaŭlastaj produktitaj diskoj.

Jam de 1990aj jaroj, ni kunlaboras kun afrikaj artistoj, sed neniam eblis fari tutan albumon per Esperanta afrika muziko, kaj post plurjara strebado kaj kontaktado, aperis la oportuno por finfine eldoni kompilon de artistoj el Kinŝaso (Konga Respubliko) kun Konga Espero la grupo de Denizo Rock Tamba, Vigla Muziko de Dido Fundu, kaj Mayoma Dankembo, aŭtoro kaj komponisto kies kantoj interpretas JoMo el Tuluzo. Tio estas ekzemplo de longjara kaj bona kunlaborado.

La alia ekzemplo estas la artisto Eterne Rima, kiu pretigis sian unuan repdemon en 2000 en Pollando, sed pro multegaj kialoj ne povis eldoni ĝin. Post kelkajara translokiĝo en Tokio, Japanio, li sukcesis starigi hejman studion kaj finfine en 2009 li prilaboris sian eldonotan albumon. Vinilkosmo instigis kaj helpis lin por plibonigi kaj poluri sian muzikon. Finfine la kunlaborado efikis kaj el tio rezultigis la albumo "Samideano".

Jen du belegaj ekzemploj pri internacia kunlaborado kun Esperanto-artistoj, ĉu ne?

Vinilkosmo per sia agado celas instigi novajn artistojn kanti en Esperanto, kaj ankaŭ altiri atenton al la lingvo kaj al neesperantista publiko.

Alia aspekto de nia agado estas plenumita de la asocio EUROKKA (per kiu estis starigita la eldonejo) tio estas programi Esperanto-artistojn por artaj programoj de renkontiĝoj, kongresoj kaj festivaloj. Tio ankaŭ helpas, subtenas kaj instigas la artistojn daŭre krei novajn projektojn kaj evolui.

**Mikrofone: Krom artistoj, ankaŭ kun kiuj Vinilkosmo kunlaboras?**

Flo: Ni kunlaboras ankaŭ kun artaj reĝisoroj, kiuj mem estas muzikistoj, por kompilprojektoj pri specifaj muzikistiloj, ekzemple Julio Calegari el Brazilo por la subgrunda kompilo, Gunnar Fischer el Germanio por la Elektronika kompilo, Platano kaj Roger el Francio kaj Hispanio por la Hiphopa kompilo, Rogener Pavinski kaj Leandro el Brazilo por la metala kompilo. Ne limiĝas muzikaj artistoj, ĉar ni kompetentas en tio. Krome, ni kunlaboras kun grafistoj kaj fotistoj por la preparado de la artaj libretoj de la diskoj, kun verkistoj kaj poetoj por la adaptado, tradukado kaj enmuzikigo de kantotekstoj. Pri grafikaĵo por ĉiuj diskolibretoj, diversaj kunlaborantoj pretigis fotojn kaj ilustraĵojn. Pri tekstoj, ekzemple pri venonta ampleksigita reeldono de la albumo de Jacques Yvart, pri kantoj de Brassens "Brassens plu", kunlaboris tuta teamo de talentuloj (Roel Haveman, Marcelo Redoulez, Bernard Legeay, Georges Lagrange, Michel Duc Goninaz, Claude Piron, ktp), kiuj tradukis kaj adaptis tekstojn el la franca al Esperanto.

**Mikrofone: Ĉu Vinilkosmo instigas neesperantistajn artistojn kanti esperante?**

Flo: Estis kazoj enkadre de kompiloj, en kiuj partoprenis neesperantaj artistoj kaj bandoj pro simpatio al Esperanto. Estis du gravaj kazoj. En la komenco Jacques Yvart kantis papage en la unua titolo aperinta en lia albumo "Bonjour la Paix" (esperante: Bonan tagon, paco) kaj sekve en la Vinilkosmo-kompil' Vol.1. Sed li eklernis reale Esperanton en la Esperantogrupo de Dunkirko. Kaj tio estis ege utila al li por la unua albumo "Jacques Yvart kantas Georges Brassens en Esperanto". Nun li relative flue parolas kaj komprenas nian lingvon.

Alia kazo estas Morice Benin, kiu eklernis la prononcmanneron de la lingvo por prilabori la albumon "Inspir'" eldonita de Vinilkosmo. Sed post la registrado de la albumo, kiu estis ege ŝvitiga, li lanĉiĝis en aliaj projektoj kaj mankis al li tempo por pludaŭrigi lernadon de la lingvo. Li ankaŭ iom elreviĝis pro la fakto, ke li maloftege

estis invitita en Esperanto-kongresoj por koncerti. (ekzemple li neniam estis invitita koncerti en UK, kvankam EUROKKA proponis lin) Resume li multege laboris por la disko sed sen veraj rezultoj kaj akcepto de la esperanto-movado poste.

**Mikrofone: Ĉu artistoj, kiuj bone interrilatas kun Vinilkosmo, aktivas en Esperantaj renkontiĝoj kiaj UK kaj IJK?**

Flo: Nu tio estas tikla. Devus esti pli ofta kaj altkvanta akcepto de aktualaj artistoj en tiuj grandaj Esperanto-kongresoj, ĉar estas la plej gravaj lokoj, kiuj devus prezenti kiel eble plej vastan panelon de Esperanto-artistoj. Ĉiujare estas enprogramitaj kelkaj sed bedaŭrinde ne sufiĉe. Ĉiam estas baro pro financo. Sed ja ni instigas kaj klopodas, ke la kongresoj kaj diversaj renkontiĝoj invitu Esperanto-artistojn koncerti en bonaj kondiĉoj. Tio brile okazis en UK okazinta en Montpellier, ĝuste en kiu EUROKKA faris la programadon de la artaj aranĝoj interkonsente kun UEA kaj neniu bedaŭris havi elstaran kaj riĉan artan programon. Bedaŭrinde tio ja ne estas la kazo en ĉiuj UK aŭ IJK.

La partopreno per programado en koncertoj en Esperanto-aranĝoj estas laŭ mi la plej instiga formo por ke artistoj poste daŭre pluverku kantojn en Esperanto. La celo estas ne nur la disko sed ankaŭ la scenejo, en kiu la artisto povas esti en kontakto kun la publiko kaj tie prezenti siajn verkojn.

Mi mem partoprenis en organizado de multaj festivaloj kaj spektakloj: dum pluraj jaroj de la festivalo Musicalèze, de la spektakloj de la SAT-amikaraj kongresoj en Bordojo, Amboise kaj Limoĝo, de du KEF-oj en Skandinavio ktp. Mi respondecis pri organizado de la kultura programo en la Universala Kongreso de Montpellier, en julio 1998. Sekve de la sukceso de tiu programo la Unuiĝo Franca por Esperanto petis min lanĉi la projekton KAFE. Mi elektigis kiel Prezidanto de Esperanto Midi-Pyrénées en junio 1999 kun la tasko plenumi KAFE-n. En 2006, 2007, 2009 kaj 2010 pere de EUROKKA mi kunorganizis la muzikan programon de FESTO.

**Mikrofone: Kiamaniere Vinilkosmo prezentas al la publiko nove produktitajn diskojn?**

Flo: Vinilkosmo uzas kiel eble plej multajn rimedojn por disvastigi informon pri novaj aperintaj albumoj surdiskaj aŭ

virtualaj ne nur al Esperanto-gazetaro kaj amaskomunikiloj (radioj, podkasto, retradioj kaj gazetoj) sed ankaŭ al diversaj sociaj retoj kiaj Ipernity, Facebook, Myspace, Esperanto.com, Esperantujo, Twitter, LinkedIn.

Ankaŭ nia Informletero de Vinilkosmo, kiu pli malpli anstataŭigis nian gazeton "Rok-gazet", estas grava informilo, kiun ni dissendas en plej diversaj dissendolistoj por varbadi maksimume. Tiuj Informletero estas arkivataj kaj konsulteblaj en la retejoj de [www.vinilkosmo.com](http://www.vinilkosmo.com) kaj EUROKKA <http://artista.ikso.net/eurokka>.

**Mikrofone: Pro kiaj konsideroj Vinilkosmo funkciiĝas mp3-servon en la interreto?**

Flo: De 4 aŭ 5 jaroj, Vinilkosmo suferas pro drasta disfalo de diskovendo. Pri tio estas pluraj kialoj: la ekonomia krizo, piratado kaj elŭtado en interreto. La teknikoj ankaŭ multege evoluis, dank' al la komputiloj kaj interreto. Vinilkosmo devis adaptiĝi al tiu evoluo: unue antaŭ 10 jaroj Vinilkosmo starigis retan diskoservon [www.vinilkosmo.com](http://www.vinilkosmo.com) por ebligi enretan aĉetadon de diskoj, kaj en julio, 2009, Vinilkosmo malfermis elŭtejon [www.vinilkosmo-mp3.com](http://www.vinilkosmo-mp3.com), kiu disponigas la plenajn albumojn aŭ unuopajn muzikojn eldonitaj de Vinilkosmo kaj la novajn de artistoj, kiujn vinilkosmo distribuas. La muzikoj estas disponeblaj laŭ formatoj MP3 kaj OGG sed ankaŭ por la diskoj elĉerpitaj aŭ por la virtualaj albumoj laŭ FLAC senperda formato.

Ankaŭ elŭteblas tie muzikvideoj.

Krome, fine de 2009 Vinilkosmo aliĝis al la federacio de sendependaj eldonejoj CD1D kaj prezentas en tiu retejo elekton de Esperanto-artistoj kaj albumoj eldonitaj de Vinilkosmo laŭ FLAC senperda formato ĉe <http://cd1d.com/fr/structure/vinilkosmo-Esperanto-muzik-prod>. Tio donas al produktitaĵoj de Vinilkosmo la eblecon esti videblaj kaj alireblaj al pli vasta kaj nesperanta publiko.

**Mikrofone: El viaj vortoj sentebas, ke ĝenas Vinilkosmo piratado. Do kio estas la elirejo?**

Flo: Jes. Kompreneble kiel ĉiuj muzikeldonejoj kaj libroeldonejoj. Malmulton eblas fari krom instigi homojn aĉeti leĝe kaj ne piratumi. Necesas konscii pri la problemo. Kaj tio estas la rolo de ĉiuj, kiuj konscias pri la problemo

(amaskomunikiloj, artistoj, sed ankaŭ uzantoj kaj muzikŝatantoj).

Vinilkosmo klopodas eldoni laŭ kiel eble plej alta profesia kvalito la verkojn de Esperanto-artistoj. Tio havas altan koston, kiu estas eltenebla, se ĉiuj kontribuas kaj subtenas, aĉetante diskojn kaj elŭtante albumojn aŭ muzikojn en nia elŭtejo. Ne malfacilas imagi: nia eldonejo kolapsiĝos kaj malaperos, se ni ne plu sukcesos vendi eldonitajn diskojn kaj elŭtendi produktitajn muzikojn. Tio estus katastrofo por Esperanto-muziko ĝenerale, por artistoj sed ankaŭ por la tuta Esperanto-movado, se ne plu povos esti eldonita altkvalita muziko en Esperanto.

Nu simple homoj, kiuj ŝatas Esperanto-kulturon, subtenu ĝin. La eldonejo estas tie ĉi por helpi disvastigadon de Esperanto-kulturo. Sen la Esperanto-komunumo, la Esperanto-eldonejo ne havas sencon ekzisti. Alivorte, la Esperanto-komunumo kaj la Esperanto-eldonejo bezonas unu la alian kaj pro tio necesas solidareco por alfronti krizajn periodojn. Sen tio ambaŭ suferos kaj riskos plimalboniĝi.

Esperanto-muziko bezonas la subtenon de ĉiuj por ke ĝi pliampleksiĝu, kaj tio povas esti nur per la kontribuo de tiuj, kiuj aĉetas diskojn aŭ elŭte aĉetas muzikon kaj ankaŭ varbas pri ĝi al siaj amikoj kaj konatuloj, helpegas kaj subtenegas la artistojn kaj la eldonejojn por pli firma disvolviĝo de novaj verkoj, novaj artistoj, novaj muzikstiloj, ktp.

**Mikrofone: Lastatempe al kio Vinilkosmo donas atenton?**

Flo: En 2009, ni lanĉis alvokon al artistoj, kiuj eldonis en la 80-aj jaroj kasedalbumojn por ciferecigi kaj remastriigi ilin kun la celo reldoni virtualajn albumojn en nia elŭtejo. Fakte nuntempe kasedoj iĝis senutilaj kaj preskaŭ neniu plu uzas ilin jam de multaj jaroj. Gejunuloj tute ne plu uzas kasedojn kaj baldaŭ eĉ Kdojn. Ili ĉefe uzas Ipodojn aŭ mp3-legilojn.

Nia celo estas doni la eblecon al homoj remalkovri aŭ eĉ malkovri por la unua fojo tiujn preskaŭ forgesitajn rokajn mejloŝtonajn albumojn en la Esperanto-movado kaj ties kulturo. Tiel virtuale estis reldonita la unua rokkasedo de Persone "62 Minutoj". Nun ni esperas baldaŭ povi disponigi la unuan iam aperintan rokkasedon "Tute ne gravas" de la internacia rokbando Amplifiki.



## Tra la Mondo – 世界各地

### Esperanta organizaĵo por UN ekfunkcias

En la UK en Havano estis anoncita la fondo de la organizaĵo Esperanto por UN, kiu laboros por altigi la profilon de Esperanto ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj por disvastigi informojn pri UN inter la esperantistoj.

UEA havas formalajn rilatojn kun UN kaj Unesko jam ekde la jaro 1954. Per sia oficejo en Novjorko, UEA flegas tiujn kontaktojn. Laborgrupoj en Parizo, Ĝenevo kaj Vieno faras similan laboron. De tempo al tempo UEA prezentas sian vidpunkton pri lingvaj demandoj en kunsidoj kaj konferencoj de UN kaj Unesko. UEA ankaŭ kaj mem organizas konferencojn kaj seminariojn en Ĝenevo, Novjorko, Parizo kaj aliloke por atentigi pri la valoro de Esperanto kiel neŭtrala komunikilo inter la homoj kaj pri la problemo de lingva malegaleco ĝenerale.

La nova organizaĵo klopodos kreskigi subtenon por la laboro de UEA ĉe UN kaj Unesko. Por

sistema informado pri UN inter la esperantistoj ĝi lanĉos Esperantan retpaĝaron pri UN kaj Unesko. Ĝi argumentos por subtenado de UN per informado al la publiko pri ĝia valoro, instruado pri UN en la lernejoj, konsciigo pri la valoro de internacia ordo, kaj laboro por atingi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

### Programeroj de la Havana UK en la reta kinejo

Multaj programeroj de la 95-a Universala Kongreso en Havano estis filmitaj kaj la registraĵoj aperos iom post iom en la Reta Kinejo de UEA. La laboro estas farata volontule kaj etendiĝos verŝajne tra du-tri monatoj. Kiel la unuajn la filmisto Francisco L. Veuthey finpretigis la programerojn La nova Estraro sin prezentas kaj La Centra Oficejo respondas, kiuj jam estas videblaj.

La programero La nova Estraro sin prezentas daŭris 1,5 horojn. En la Reta Kinejo ĝi estas dividita en

tri partojn. La 50-minuta La Centra Oficejo respondas estas dividita en du partojn.

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

### Konsisto de KAEM konfirmita

La Estraro de UEA konfirmis formale la konsiston de la Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) surbaze de rekomendo, kiu rezultis el balotado okazinta en la ĉi-jara Azia Esperanto-Kongreso.

Kiel prezidanto de KAEM funkcias Sasaki Teruhiro el Japanio kaj kiel vicprezidantoj Wang Ruixiang el Ĉinio kaj Hoang Ngoc Boi el Vjetnamio. Sekretario estas Park Yong-sung el Korea Respubliko kaj kasisto P.V. Ranganayakulu el Hinda Unio. La aliaj komisionanoj estas Muhammad Zubair (Pakistano), Reza Torabi (Irano), Mukunda Raj Pathik (Nepalo), Fajzullaev Ĝamŝid (Taĝikio), Esti Saban (Israelo) kaj Chimedtseren Enkhee (Mongolio).

*Gazetaraj Komunikoj de UEA*

# Mikronovelo – 微型小说

## Speciala Premio



Kelkajn tagojn post mia foresto pro kunveno, iu de mia butiko skribis al mi: “Yang Li de la fako de vestoj estas tiel arbitra, ke ŝi vestas sin per manĉura robo de la butikoj kaj eĉ iras hejmen surhavante ĝin...” Do tuj post la finiĝo de la kunveno mi hastis al la butikoj antaŭ ol hejmeniri.

Yang Li estas ĉiam ŝike vestita. Nun ŝi eĉ portas sur si robon de la butikoj... Ho, ĉagrena manĉura robo! En la lasta monato mi vizitis la provincaĉefurbon kaj aĉetis tie cent manĉurajn robojn, aŭdinte de aliaj, ke ĉi-somere furoros tia robo. Sed ekster mia atendo, virinoj en mia urbo ne havis la kuraĝon de grandurbanoj, kaj neniu robo estis vendita en pli ol 20 tagoj. Kaj pro tio leviĝis ironio: “Ĉu nia malgranda urbo povas esti komparata kun granda urbo?”

Antaŭ la vendotablo de vestoj. Yang Li estis interparolanta kun klientino. Mi tuj trovis, ke la robo sur ŝia korpo ĝuste estas aĉetita de mi en la provincaĉefurbo.

“La vesto bonege sidas sur vi,”

diris la klientino.

“Ĉu vere?” Yang Li turnis sin por plene montri la veston al la klientino. “Ĉu ĝi bone sidas? Ĉu ĝi estas bela?”

“Ĉu vere vi jam ne havas eĉ unu tian robon por vendi al mi? Do mi mendu ĉe vi.”

Rigardante al la foriranta klientino, mi ekdubis en mi: “Kian ruzajon ŝi artifikas?” Notinte ion en sia kajero, Yang Li levis la kapon kaj ekridis al mi, kvazaŭ ŝi antaŭlonge rimarkis mian atenton. “S-ro direktoro, ĉu vi venas por enketi pri la robo? Mi scias, ke multaj en la butikoj babilas pri mi.”

Ŝia malkaŝemon konsternis min. “Oni diras, ke vi hejmeniras surhavante tiun robon.”

“Jes, en la lastaj tagoj, surportante ĝin mi iris hejmen, rigardis filmon, trabutikis kaj iris ĉien kie multas homoj, kaj hieraŭ vespere en ĝi mi eĉ ĉeestis balon en la Junula Domo.”

“...Sed kial ĵus antaŭe vi ne

vendis al la klientino la robon?”

“Ĉu tion oni ne devas imputi al via malkuraĝo? Vi enaĉetis nur cent robojn, kaj kion mi povas vendi?”

Mi ne povis kredi al miaj oreloj: “Ĉu la roboj elĉerpiĝis?”

“La cent roboj jam elĉerpiĝis, ne estas vere, ke nialokaj virinoj ne ŝatas belajn vestojn, sed mankas al ili iniciatanto. Vi vidu,” Yang Li malfermis la plenplene skribitan kajeron al mi, “oni jam mendis pli ol 200 tiajn robojn, kaj nun estas via vico solvi la problemon, mia direktoro!”

Mi komprenis la tutan aferon. Mia koro estis plena de ĝojo kaj danko. Mi diris al ŝi: “Mi konfidu al vi la aĉeton de roboj en la provincaĉefurbo, kaj vi tuj iru morgaŭ.”

“S-ro direktoro, sen via permeso mi surportis la robon, kaj mi pagu por ĝi.”

“Ne,” mi senhezite mansvingis kaj diris: “La robo estu via, kiel speciala premio por vi!”

### Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondoj	KHz
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

Konstanta adreso: Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

Tel: +86(10)68891940

Fax: +86(10)68891164

Retadreso: [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.cn>



Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renoviĝas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.



Esperanto service, CRI-36

China Radio International

P.O. Box 4216 Beijing, China 100040

Tel: +8610 68891940

+8610 68891916

Fakso: +8610 68891164

E-mail: [espradio@cri.com.cn](mailto:espradio@cri.com.cn)

Retadreso: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉefredaktoro: Zhao Jianping

Redaktoroj: Wang Fang

Xiao Henggang